

Esperanto in Niedersachsen

Esperanto en Malsupra Saksio. Januaro 2008. N-ro 1/2008

Internationale Delegationen in Herzberg

Am Freitag, dem 26. Oktober 2007, wurden die Vorstände der Deutschen Esperanto-Jugend (unter Leitung von Andreas Diemel aus Essen, Julia Hell aus Chemnitz und Paul Ebermann aus Berlin) und der Polnischen Esperanto-Jugend (mit der Vorsitzenden Irmina Szustak aus Warschau) im Herzberger Rathaus empfangen. Als Repräsentant der Britischen Esperanto-Jugend nahm Rolf Fantom und als Vertreter der Pfadfinder Thomas Dresler an der Sitzung teil. Vom Esperanto-Zentrum in Herzberg waren Ingo Sommer und der Leiter Peter Zilvar erschienen.

Die Jugendlichen freuten sich auf Herzberg – die Esperanto-Stadt – und stellten schon die ersten Veränderungen in Herzberg fest, z. B. zweisprachige Begrüßungsschilder, den neuen Rundwanderweg "Wasser-8" und die ersten Speisekarten von Herzberger Gaststätten mit Texten in Esperanto.

Gern beantworteten Bürgermeister Gerhard Walter und Abteilungsleiter Michael Nienstedt viele Fragen. Die Jugendrepräsentanten freuten sich über die herzliche Gastfreundschaft in Herzberg - der Esperanto-Stadt.

Die Polnische Esperanto-Jugend möchte die esperantosprachigen Kontakte zur Herzberger Partnerstadt Góra in Polen unterstützen. Außerdem möchten die Vertreter der Esperanto-Jugend in den nächsten Jahren auch internationale Jugendbegegnungen in Herzberg organisieren.

Die stellvertretende Vorsitzende der Deutschen Esperanto-Jugend, Julia Hell aus Chemnitz, überreichte dem Herzberger Rathaus die Flagge mit dem grünen fünfzackigen Esperanto-Stern, die in den nächsten Jahren sicher häufig zum Einsatz kommt.

*nach einer Pressemitteilung der Stadt Herzberg am Harz
vom 1. November 2007*

Aktivula semajnfino de GEA

La 2-an ĝis 4-an de novembro 2007, Germana Esperanto-Asocio okazigis en Herzberg – la Esperanto-urbo – semajnfinojn por aktivuloj en la Landaj Ligoj. Por EMAS partoprenis ĝia prezidanto, Thomas Heberlein el Hameln, kaj mi (konsilantarano). La kunsidon, al kiu venis 23 personoj, gvidis Wolfgang Bohr.

En prelego de la GEA-prezidanto d-ro Rudolf Fischer kaj posta, longa diskutado estis klarigitaj la taskoj de GEA, ĝia strukturo, ĝiaj meritoj kaj mankoj kaj ĝia kunlaboro kun la landaj ligoj.

Rudolf parolis pri la kvar tavoloj de niaj organizoj: loka grupo (aŭ faka ligo), landa ligo (ekz. EMAS), nacia asocio (GEA) kaj mondovasta asocio (UEA). Li pledis por simila strukturo en ĉiuj landoj de la mondo kaj por tio, ke iu persono, kiu aliĝas al unu el la kvar tavoloj, ekz. al EMAS, fariĝas samtempe membro en la loka grupo de sia loĝloko kaj korporativa membro de GEA kaj de UEA. La aliĝilo, kiun li subskribas, devas informi pri tiu rilato. Krome, kompreneble, li aŭ ŝi povas subteni tiun organizon, kie li prefere kunlaboras, per individuaj subtena membreco. Tio ĝis nun ne ĉie funkcias, ekzemple GEA havas nenium informon pri tio, kiuj estas la multaj germanoj, kiuj pagas membrotizon al UEA.

En GEA, ekzistas nun tri kategorioj de membroj:

- a) ordinaraj membroj, kiuj pagas kotizon rekte al GEA kaj per tio abonas la gazeton “Esperanto aktuell”;
- b) subtenantaj membroj, kiuj subtenas per unufojaj aŭ ripetaj donacoj aŭ en alia maniero,
- c) korporativaj membroj, kiuj estas membroj de asociitaj societoj, speciale la lokaj grupoj, fakaj organizoj kaj la landaj ligoj.

Oni ankaŭ diskutis pri la fluo de monrimedoj inter tiuj tavoloj. Pri la tasko de informado al membroj, interesuloj kaj la publiko. Pri enhavo, ofteco kaj amplekso de “Esperanto aktuell”. Pri la uzo de la interreto, speciale pri dissendolistoj kiel nia “Esperanto-EMAS”. Kaj pri tio, ke ankoraŭ mankas vasta datumbanko, kiu ne nur taŭgas por la kolekto de membroadresoj, sed ankaŭ por varbado, ĉar ĝi enhavu ĉiujn, kiuj en iuj varbkampanjoj montris intereson por Esperanto kaj deziris informojn. Ĝi devas esti utila kaj uzebla al ĉiuj tavoloj de nia

aktiveco, do ne nur al GEA, sed ankaŭ al landaj ligoj, grupoj kaj fak-organizoj.

Okazis ankaŭ kelkaj prelegoj, ĉefe de d-ro Wolfgang Schwarz el Dresden sub la temo "Was kann der Verbandsrat zur Sicherung des Esperanto-Erbes beitragen?" kaj de Petro Zilvar pri "Koncizaj informoj pri Esperanto-urbo kaj ĝemelurbaj kontaktoj".

d-ro Klaus Schlüter, Laatzen

Interview auf Kabelfernsehsender h1

Dienstag, den 27. November führte Robert Weemeyer in seiner Mittagspause ein Interview mit dem lokalen Hannover Fernsehsender h1 über Esperanto. Das Interview wurde in der Sendung *0511/tv.lokal* um 18.45 Uhr (wiederholt um 22.00 Uhr) gesendet, die täglich aktuelle Ereignisse in der Stadt behandelt. Wir wissen zwar nicht, warum Esperanto gerade an diesem Tage besondere Aktualität genoss, letztendlich erschien uns diese Frage aber zweitrangig. ;)



Am Abend fand wieder unsere Dienstrunde im Café Extrakt statt, und wir vier waren gespannt, ob eventuell ein kurz entschlossener h1-Kucker auftauchen würde. Es kam denn doch keiner, was aber den Abend nicht weniger unterhaltsam machte. Vielleicht ergibt sich ja in den nächsten Tagen noch einen Kontakt durch dieses Interview.

Ansonsten wurden an diesem Dienstagabend auch wichtigere Dinge besprochen: Robert berichtete über seinen Wochenendkurs im Rahmen des Kulturkursprogramm des AStA, und am zweiten Adventswochenende zieht eine weitere Esperantistin nach Hannover.

Sebastian Hartwig, Hannover

Peter Zilvar estas esperantisto de la jaro 2007

En la jaro 1998 la redaktoro de la gazeto *La Ondo de Esperanto*, Aleksander Korĵenkov, skribis en artikolo:

Estas preskaŭ nekredeble, ke en Esperantujo ankoraŭ ne ekzistas honora titolo por persono plej elstare rekomendinta sin, malkiel en la Granda Mondo, kie la gazetaro (ekzemple Time) faras la ĉiujaran proklamadon de »la homo de la jaro« tradicia institucio. Multaj sportaj, kulturaj kaj amatoraj komunumoj ĉiujare elstarigas inter siaj anoj la plej eminentajn.

La Ondo de Esperanto decidis ŝtopi la breĉon kaj iniciatis la proklamon de La esperantisto de la jaro. Per tiu honora titolo estos distingata persono, kiu je la koncerna jaro plej multe kontribuis al Esperanto. Pri la efektivigo de la projekto zorgos du komisionoj – kandidatiga kaj elekta –, en kiuj kunlaboros kompetentaj personoj, ĝuantaj internacian rekonon kaj prestiĝon.

Nun kreiĝis jam la dekan fojon la esperantisto de la jaro. El dudek proponitoj kun konataj kaj famaj nomoj elektiĝis nia samlandano Petro Zilvar pro diversflanka agado por kaj per Esperanto en Herzberg, la Esperanto-urbo. Lia agado estis intensa ankaŭ en 2007: serio de altnivelaj seminarioj kaj ekzamen-sesioj, starigo de novaj ZEOj, imitinda loka informado pri Esperanto, evoluigo de kunlaboro inter Herzberg kaj Guhrau (Malsupra Silezio) k. a.



Ni kore gratulas al Petro Zilvar!

Sebastian Hartwig, Hannover

Transloĝiĝoj al Malsupra Saksio

En decembro transloĝiĝis al Hanovro Carolin Hötzl, kiu ĵus sukcese finis siajn studojn pri matematiko, muziko kaj la germana (por fariĝi bazlerneja instruistino) en la universitato de Gießen. La 31-an de decembro, dum la Internacia Seminario en Würzburg, ŝi estis elektita estraranino de Germana Esperanto-Junularo pri financoj.



Krome en aŭtuno revenis al Malsupra Saksio, nome al Emden, Sebastian Kirf, estrarano de Germana Esperanto-Asocio pri publika agado. Sebastian estas konata interalie pro liaj sukcesaj kursoj de Esperanto en la faka altlernejo en Emden.

Robert Weemeyer, Hannover



Ni tre funebras. Nur tri tagojn post sia 69-a naskiĝtag-reveno, kiun ŝi ankoraŭ festis en gaja rondo, mortis en sia loĝejo pro pulma embolio



Eleonore Jüngel.

26.12.1938 - 29.12.2007

En la jaro 1992 ŝi komencis lerni Esperanton kaj en la sekvaj jaroj ŝi vizitis multnombrajn Esperantorenkontiĝojn. Kiel aktiva membro de la Esperantogrupo Hameln ŝi ne nur partoprenis regule ĉe la grupaj kunvenoj kaj raportis pri siaj vojaĝoj, ŝi ankaŭ helpis dum la organizado de la “Rataj Rendevuoj” kaj de la informstandoj sur la Hamelnaj kulturtagoj.

Apartan dankon ŝi meritas antaŭ ĉio por la afabla akcepto de niaj eksterlandaj Esperanto-gastoj, kiujn ŝi ofte gastigis kaj helpeme prizorgis.

Ŝia morto postlasos grandan truon en nia grupo. Ni ofte pensos pri ŝi kaj aparte sentos la foreston de ŝia Berlina humuro.

Heinz W. Sprick, Hameln

Presindikoj

„Esperanto in Niedersachsen“ estas la dumonata informilo de EmaS.
Redaktoro: Robert Weemeyer, Im Moore 34, 30167 Hannover,
robert.weemeyer@esperanto.de

Kalendaro

Januaro

22-a **Hameln:** Ratkaptista Bando, 19a h

Hannover: Marda Rondo, 19a h

29-a **Hannover:** Marda Rondo, 19a h

Februaro

5-a **Hameln:** Ratkaptista Bando, 19a h

Hannover: Marda Rondo, 19a h

8-a – 10-a **Herzberg:** Esperanto-Wochenendkurse (versch. Niveaus)

12-a **Hannover:** Marda Rondo, 19a h

15-a – 17-a **Herzberg:** 36. Studsesio: offene Weiterbildung

19-a **Hameln:** Ratkaptista Bando, 19a h

Hannover: Marda Rondo, 19a h

20-a **Hannover:** Esperanto-Gruppe Hannover, 19a h 30

21-a **Brake:** Jahreshauptversammlung der Gruppe Unterweser

26-a **Hannover:** Marda Rondo, 19a h

Marto

1-a **Nordenham:** Besenwerfen der Gruppe Unterweser

4-a **Hameln:** Ratkaptista Bando, 19a h (Jahreshauptversammlung)

Hannover: Marda Rondo, 19a h

11-a **Hannover:** Marda Rondo, 19a h

18-a **Hameln:** Ratkaptista Bando, 19a h

Hannover: Marda Rondo, 19a h

19-a **Hannover:** Esperanto-Gruppe Hannover, 19a h 30

25-a **Hannover:** Marda Rondo, 19a h

27-a – 30-a **Göttingen:** 5. Sub_18-Treffen der DEJ

Brake: Gaststätte Landhaus, Am Stadion 4, 26919 Brake,

tel. 04401 5011 kaj 5012

Göttingen: Jugendherberge, Habichtsweg 2, 37075 Göttingen; kontakto: Leo

Sakaguchi, Am Kreuzberg 5, 63776 Mömbris, tel. 06029 6186

Hameln: Ratkaptista Bando, Sumpflume, Am Stockhof 2 a, 31785 Hameln;

kontakto: Heinz. W. Sprick, Schmiedeecke 2, 31850 Hessisch Oldendorf, tel.

0162 7536396, hameln@esperanto.de

Hannover: Esperanto-Gruppe Hannover, Freizeitheim Linden, Archiv,

Windheimstraße 4, 30451 Hannover

Marda Rondo, Café Extrakt, Hahnenstraße 3, 30167 Hannover

Herzberg: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstraße 6, 37412

Herzberg, tel. 05521 5983, esperanto-zentrum@web.de